Eterna Reĝo, Plejaltul'

ÆTERNE REX, ALTISSIME



3. La tri-etaĝa mond-struktur,
ĉielo, tero kaj infer',
submetu sin al Via fort'
genu-fleksante antaŭ Vi.

4. Anĝeloj vidas kun admir'
la ŝanĝon de la homa sort':
el pek' la karnon savas karn',
la karno, kiu estas Di'.

5. Vi, Kristo, estas nia ĝoj',
Vi restas nia daŭra glor',
la mond-aferojn regas Vi
kun ĝoj' pli granda ol sur ter'.

6. Ni Vin petegas kun insist'
pro niaj ŝuldoj pri pardon'.
Sin levu supren nia kor'
al Vi per elĉiela grac'.

7. Ne punu nin laŭ nia ŝuld',
sed, kiam venos Vi juĝist'
sur ruĝa nub', redonu Vi
la kronon, kiun perdis ni.

8. Nun estu glor' al Vi, Jesu',
iranta supren al ĉiel',
kun Viaj Patro kaj Spirit'
tra ĉiuj tempo kaj eon'.

ÆTERNE REX, ALTISSIME • *ERHABNER FÜRST DER EWIGKEIT • M: ĉe Johannes Georg Braun, Echo hymnodiæ cœlestis 1675, nGL (Speyer) 801, tie kun nur 5 strofoj • latina T: nekonata verkinto, eble 5a jarcento • E: Albrecht Kronenberger 2008

La latina kaj esperanta tekstoj troveblas (2014-09-09) ĉe:

http://eo.wikisource.org/wiki/%C3%86terne_rex,_altissime

kaj en KRISTANAJ FONTOJ:

http://web2py.dli-info.net/urban/static/himnoi/Aeterne_rex_altissime.pdf